


La suno donas al mi agrablon sur la vojo
Libera kaj senzorga, kie ajn mi loĝas
Ni nin disigu tra la tuta mondo.
Pro tio ĝi tiel granda estas.

Göteborg 27/9 46

**POŜTKARTO**

Mi sendas al vi ~~10~~ 14 respondkuponoj kaj petas vin noti min kiel abonanto kaj sciigu al mi kiam la abono finas por ke mi sendos pli.

11. 20 Skl.

Kun saluto Einar Adamson

10 APR. 1947

Sendu al: Redaktoro

Einar Adamson
Värmlandsgatan 18
GÖTEBORG, Svedlando

Einar Adamson

ESPERANTO, la internacia lingvo

S-ro Einar Adamson
Göteborg

Den Haag 9-5-1947

Estimata Samideano,

Ni tre petas pardonon pro la tro longa prokrastiĝo de respondo je via letero de la antaŭa jaro. Ni bone ricevis la 14 respondkuponojn kaj sendos al vi la tutan jarkolekton 1946 de La Praktiko. La prezo estis 24 steloj, sed nun la duono, do 12 steloj. ( 100 steloj = 33,58 sv.kr.)

La 14 respondkuponoj estas iom tro malmulte, sed tio ne gravas. En ĉi tiu jaro La Praktiko bedaŭrinde ne povas aperi pro manko de papero, sed la aktivaj membroj de la Universala Ligo ricevos anstataŭ ĝi La Heroldon de Esperanto.

Eventualajn pagojn vi povos fari al nia sveda reprezentanto: S-ro T.Morariu, Jakobsgatan 32. III, Stockholm; poŝtkonto XIII 177108.




Nigra, blanka aŭ flava
tio estas tute egala.
Ni estas gefrata rondo
ĉirkaŭ la tuta mondo.

(Martin Andersson)

POŜTKARTO

Al

Red de Praktiko

Universala Ligo

Riouwstraat 172

DEN HAAG

Holland

Göteborg 8.6.1950

Samideanoj! Jam dum febr. mi sendis al L.Åberg ,Skövde abono de Praktiko por mi kaj por Folkskoleseminariet 8.40+8.40 kr.
Viktoriagatan,Göteborg

Mi sendis al li 16 kr. Nun mi ric. n:roj 3-4.Do plej kredeble vi ricevis la mendojn,sed mi ne ricevis la gazeton nroj 1-2. Ĉu estas sendita.

Kore salutas

Einar Adamson

Einar Adamson
Värmlandsgatan 18
GÖTEBORG

ESPERANTO, la internacia lingvo

S-ro Einar Adamson
Göteborg

Den Haag 13-6-1950

Kara Samideano,

Ni bone ricevis vian karton de la 8-a. La afero estas jena: Je nia granda bedaŭro kaj konsterniĝo, s-ro Aberg jam de unu jaro ne sendas al ni liston de novaj abonantoj nek pagojn, malgraŭ multegaj urĝaj admono noj. Ni plene fidas lin, sed ni timas, ke li prenis tro multajn taskojn sur sin kaj ne plu povas ilin plenumi. Sed... ni tamen sendis la gazeton al ĉiuj malnovaj abonantoj, eĉ ne ricevinte iliajn pagojn. Do vi, kiel malnova abonanto devis ricevi la numeron 1-2- kaj certe ĝi estas forsendita al vi. Evidente ĝi perdiĝis ĉe la poŝto. Ni do sendos samtempe al vi tiun numeron denove.

Alia afero estas kun Folkskoleseminariet, ĉar ĉi tiu seminario estas nova abonanto, pri kio ni nenion aŭdis. Venadas multaj plendoj el Svedujo, kaj ni estas senpovaj. Post jusa telefonado kun s-ro A , li promesis ordigi la aferojn. Ni do sendos ambaŭ kajerojn al

Al Adamson, send. denove 147/8
Al Folkskolsemin. send. 147-50 + 151/2 + 153/4 + 155/8

BREVKORT

CARTE POSTALE




Universala Ligo

Riouwstraat 172

H A A G

Holland

Göteborg la 7-an de jan. 1953

Amikoj!

Dum miaj vojaĝoj mi ricevis de unu persono -Bog Boge-kiam li pagis la jarkotizon al UEA, 200:- kr por UL ĉar li volas esti Dumviva Membro. En UEA nun ne sufiĉas per 200 ,do estas al vi mi pagu. Kaj mi do demandas, ĉu mi pagos ĝin al sveda konto via,kien mi sendos mian jarkotizon au eble ,kiam rilatas tiel granda sumo mi volas ke mi sendu ĝin per bankĉeko.

Tuj kiam mi ricevis vian respondon mi sendos la monon. Kun salutoj por la nova jaro

Sincere Via

Einar Adamson

Einar Adamson
Vinterlandsgatan 18
GÖTEBORG

Por viaj afrankoj mi povas sendi
kiam mi baldaŭ sendos pagon por
LA PRAKTIKO.

**BREVKORT**

CARTE POSTALE







Red-o Praktiko
"Universala Ligo"
Riouwstraat 172
Den Haag
(Nederländerna)

Göteborg la 15.1.1953

Redakcio de "La Praktiko"

Se estas eble mi tre volonte deziras prunti la kliŝon de policisto Vernooij, kiu esta publikigita en L a P r a k t i ko n:ro 9 ,paĝo 116
Volonte mi je alia okazo pruntedonas al vi alian kliŝon, au aliajn ,kiuj mi uzas en "FREDEN"
La Paco, organo de Sveda Asocio por Paco kaj Arbitracio en kiu mi ĉiunumere havas 2 kolonojn pri Esperanto kaj iam ankaŭ mi tie reklamis por La Praktiko / La asocio menciita estis inter la pacorganicacioj kiuj iniciatis la pacopalacon en Haag / Ĝia unua prezidanto K.P. Arnoldsson estis la unua ,kiu akcepis la pacopremio de Nobel.

Se vi volas havi kelkajn liniojn pri la 30-jara jubileo de Sveda Laborsita esperanto Asocio mi povas sendi ,ankau kliŝon el tagĵurnalo.

Kun saluto

Einar Adamson

Einar Adamson
Värmlandsgatan 18
GÖTEBORG

Al s-ro Einar ADAMSON, Göteborg.

Hago, 17-I-1953.

Kara samideano!

Ricevinte viajn poŝtkartojn de la 7-I kaj 15-I mi volonte respondas en la sekvantaj:

1) Samtempe mi sendas al vi la matricon de la kliŝo pri s-ro Vernooy. Kliŝon mem ni ne havas plu, ĉar la presejo detruis ĝin. Post uzo bonvolu resendi al ni la matricon, ĉar ni devas redoni ĝin al la redakcio de la ĵurnalo "Het Vrije Volk". En via artikolo bonvolu citi la nomon de tiu ĵurnalo. Ĝi estas la gazeto de la nederlanda politika partio "Partio de la Laboro" (social-demokrata partio, nun la plej granda en la lando kaj en la registaro).

2) La kotizon (200 Kr.) de s-ro Boge por dumviva aktiva membreco en UL bonvolu sendi ne al nia sveda poŝtkonto, pro la grandeco de la sumo, sed rekte al ni en Nederlando. Vi povas sendi per bankĉeko, sed pli simple kaj facile estas, se vi ĝiras ĝin el via sveda poŝtkonto rekte al la nederlanda poŝtkonto de Universala Ligo: Haag 408826. Tiaj ĝirpagoj laŭ niaj spertoj okazas nuntempe sen malfacilaĵoj. Multan dankon!

3) Volonte ni ricevos de vi por La Praktiko inte-

./.

./.

resaĵn artikolojn kaj kliŝojn pri aferoj en la spirito de nia gazeto. Antaŭdankon!

4) Kun la matrico ni sendas al vi deklaracio-formularojn por eventuala varbo. Ĉiukaze bonvolu uzi unu formularon por la aliĝo de s-ro Boge, ĉar ni ne havas lian adreson k.t.p.

Kun bondeziroj por la nova jaro kaj amika saluto,

s-ro Einar ADAMSON

Värmlandsgatan 18

GÖTEBORG

Zweden

Hago, 7-IV-1953.

Al s-ro Einar ADAMSON,

Göteborg.

Kara samideano!

Per la poŝtĝiro ni bone ricevis vian monsendon de 220.-- Kronoj. Ni enskribis ĝin laŭ viaj indikoj, do 10 Kr. por via kotizo 1953 (ĉi tie mi aldonas por via membrokarto la glukvitancetojn: jarkotizo plus 4 aldonaj brikoj); 10 Kronojn por la kotizo de s-ro Erik Johansson (al li ni sendis la membrokarton kaj gazeton), kaj 200 Kronojn kiel kotizon de s-ro agronomo Erik Boge. Al li ni sendis la membrokarton, nunjaran gazeton kaj la tutan jarkolekton 1952, ĉar li fakte donis al vi la monon ankoraŭ en la jaro 1952. Do li nun fariĝis Dumviva Aktiva Membro. Ni multe dankas vin pro la varbo. Ĉi tie mi aldonas por vi 62 premiokuponojn, kiujn vi meritis per la varboj nunaj kaj antaŭaj.

En januaro mi sendis al vi la matricon de policisto Vernooy. Ĉu vi jam publikigis la bildon? Tiukaze bonvolu resendi al ni la matricon.

Ni atendas de vi ankoraŭ artikolojn kaj kliŝojn, laŭ via promeso.

De FOLKSKOLESEMINARIET, Viktoriagatan, Göteborg, ni ankoraŭ ne ricevis la abonpagon por la jaro 1951, kvankam dum tiu tuta jaro ni regule sendadis La Praktikon al tiu adreso. Ĉu vi bonvolus interveni, ke tiu abono (24 Steloj = 8.40 Kronoj) estu ankoraŭ pagata? Ni estus al vi tre dankaj, se vi sukcesus aranĝigi la aferon.

Kun koraj bondeziroj kaj amika saluto,

Kara samideano! Göteborg 12/4 1953

Kore mi dankas pro la letero, mendo kvitanco k. la stelokuponoj.

La matricon de Vernooy oni eble sendis direkte al Het Volk kies adreson vi donis. Se ne ili sendos al vi. Mi hodiaŭ demandis. La gazeton mi sendos!

Pri Folkskoleseminariet Viktoriagat. Göt. (ne ekzista plu) mi pagis jam 1950 al Leonard Åberg, sed kiam ili atendis multajn monatojn mi skribis al vi k. via* sekr. notis tion. Ĉar mi dapost 2 monatoj estos en malsanulejo pro flavmalsano mi ne havos kvitancon postan por la monon al Åberg, sed povos poste sendi. Mi ĉeam pagos tuj kiam mi mendas.

Pro la malsanulejo mi ankaŭ ne povis ĝis nun aranĝi kun artikoloj k. kliŝoj. Kore kaj amike mi salutas

Einar Adamson

BREVKORT
CARTE POSTALE

S-ro Andreo Cseh
Universala Ligo
Riouwstraat 172
Den Haag
(Holland)

GÖTEBORG 1

SVERIGE 20 öre

SVERIGE 5 öre MONTELIUS 1843 1943